

FESTO DE JESUO KRISTO LA REĜO

La liturgia jaro finiĝas per soleno de Jesuo Kristo la Reĝo. Ankaŭ la mondo havos sian finon. Jesuo Kristo estas unu-nura reĝo, kiu tiun finon transdaŭros. „Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo“, judoj Jesuon malbone perceptis. Ili atendis liberiganton, gvidiston de la Dia popolo, iun potenculon kontraŭ gravuloj de tiu ĉi mondo. Ili esperis, ke ili lin ekvidos sur trono de gloro, sed Li suriris malgloran tronon de la kruco. Ili atendis Lin kun krono ornamita per gemoj, sed Li akceptis nur dornkronon. Ili atendis, ke Li venos vestista en purpuro, sed ili ekvidis Lin en purpuro de la sango. Ili opiniis, ke per la surkruca morto ĉio finiĝis kaj la krucumiton neniuj plu rememoros. Sed male tio estis komenco de lia triumfo.

Surkruce Jesuo iĝis universala Reĝo, ĉiujn Li altiras al si. Tie li ekkomencis sian regadon, montris sian amon, surkruce li donis stimulon por meditado al ĉiuj sanktuloj, kiuj plenigis tutan lian ĉielon. La kruco iĝis standardo, en kiu estas forto, kiu nin gvidas mondon, ke ĝi amu Savinton, kiu nin tiom amis. Jesuo estas ununura Reĝo, ĉar la Patro donis al Li regadon super la tuta mondo: por Li kaj pere de Li estis kreitaj ĉiuj aĵoj. Ĉio, kio havas vivon, havas vivon pere de Li. Li estas la Vivo. Jesuo estas Reĝo ankaŭ kiel homo, Li estas filo de David, la hebrea reĝo. Jesuo estas Elaĉetinto, Li estas la Reĝo el titolo de sia venko. Li liberigis nin el sklaveco de la peko, el infero. Li liberigis nin de pasioj kaj donis al ni virtojn de sankteco. Li donis al ni liberon de Diaj infanoj. Li elaĉetis nin per prezo de sia sango.

La regno de Jesuo ne estas el ĉi tiu mondo kaj ĝi ne estas la regno de nur unu lando, eĉ ne ĝi komencas sur tiu ĉi mondo. Jesuo mortis, ke Li iĝu Reĝo de ĉiuj homoj, por ke

ili havu vivon. La surteraj reĝoj mortigas aliulojn, por ke ili povu reĝi. Jesuo havas nek armeon nek armilojn, Li ne volas militojn eĉ ne sangelverŝon. Al neniuj Li entrudigas sian volon, li ne faras el homoj sklavojn, sed amikojn. Li ne havas sian limigitan teritorion. Lia estas la tuta tero kaj la ĉielo. Jesuo volas amon kiel ligilon inter la homoj eĉ kiel ligilon kun Dio. Li ne reĝas super korpoj, sed antaŭ ĉio li reĝas al la animoj, Li tronas en homaj koroj. Li ne havas palacojn, sed sanktejojn, kie Li oferas sin ĉiutage suraltare. Li ne promesas surteran gloron, nur la ĉielan. Lia regno baziĝas sur humileco. Subuloj de Jesuo Kristo estas tiuj, kiuj amas Dion kaj proksimulojn; tiuj, kiuj serĉas Dion per sincera koro; kiuj sin sanktigas per sakramentoj, konservas liajn ordonojn kaj vivas laŭ evangelio; tiuj, kiuj respektas pacon kaj ĝojas pro la graco.

Malamikoj de lia regno estas tiuj, kiuj vivas en peko; fieruloj, kiuj ne preĝas kaj ne amas Dion; kiuj amas monon anstataŭ Dion. Fiero kaj malamo estas mortiga veneno de homo. Ĉe krucpiedo estis liaj malamikoj, kiuj mokis Lin. Sed estis ĉi tie ankaŭ Maria kaj Johano, piaj virinoj, kiuj amis kaj priploris Lin. Ankaŭ nune estas ĉi tie unuj, kiuj atakas Lin, kaj aliuloj, kiuj Lin amas. Ankaŭ hodiaŭ Jesuo estas signo, al kiu oni rezistos. Estis tiel dekomence kaj tiel estos ĝisfine. Judoj diris: „Ni ne volas, ke tiu super ni reĝu!“ La pekuloj nune diras la samon ne per la vortoj, sed per la agoj. Por satisfakcii tiujn pekojn, ni strebu per la tuta koro kaj plename: „Ni volas, ke tiu ĉi Reĝo estu en ni, en niaj familioj, en niaj lernejoj, en nia socio!“ Tio estas la plej bela himno, per kiu ni povas soleni feston de nia Reĝo. ■

Jaroslav Branžovský